



Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

Nº 7

Julio, 2015

Kara Leganto, la Redakcio sincere saluras vin okaze de la 128-datreveno de nia kara lingvo Esperanto. Sanon kaj sukcesojn al ĉiuj, ne laciĝu batali por la bonstato de IL, ĝin ja subtenis Reĝino Elizabeto la II (vd la leteron), Albert Einstein, C.S. Lewis, J.R.R. Tolkien, Leo Tolstoj, Eleanor Roosevelt, Mahatma Gandhi, Jules Verne, H.G. Wells, Lord Baden-Powell, Nelson Mandela, Robert Kennedy. Mi nur povas aldoni, ke mia filino Solomea naskiĝis ĝuste 100 jaroj post la apero de la Unua libro, la 26an de Julio, 1987.

Hodiaŭ ni dediĉas iom da gazeta spaco al unu el du gravaj tradiciaĵoj de nia E-societo – junia rostviand-pikniko (Zamenhofa tago estas la dua).

Baldaŭ kvin niaj membroj partoprenos la 100an UK-on de E-o, niaj sekvaj du numeroj estos dediĉitaj al tiu renoma evento: jam pli ol 2500 aliĝis al forumo en Lillo, denove, kvin – el Ŝikago –La Redakcio



Esperanta Pikniko 2015



Kunigi diversajn homojn en unu komunumon povas nur pikniko.

Tradicia E-pikniko okazis la lastan dimanĉon de Junio en pitoreska arbar-rezervejo de Schiller Park. Kvankam la tuta nombro de partoprenintoj de estis granda, sed temoj de ĉetablaj konversacioj-interparoloj tuŝis vinon, fizikon, kemion, bier-faradon, lingvistikon, ŝoforadon kulinariion ktp. Partoprenis la piknikon la plej juna membro de nia E-komunumo Davido-Armano. Probable, venontjare lin sekvos 2 gefratoj, kiuj (aŭ unu el ili) automate fariĝos pli junaj membroj. Espereble, la sekvant-jara pikniko kolektos pli multe da samideanoj kaj pli multe da temoj estos diskutataj. Ĝis la Pikniko'2016, kie oni ekvidos niajn novajn membrojn!!!

–Atenton! Julia kunsido okazos en malnova loko: Sulzer Regional Library, 4455 N Lincoln Ave, Ŝikago: Gvidas vic-prezidanto Randio.



BUCKINGHAM PALACE

7th July, 2015

Dear Mr. Barker,

I have been asked to thank you and all your colleagues for your kind letter containing loyal greetings to The Queen, sent on the occasion of Esperanto Day 2015 which is being held on 26th July, 2015 to celebrate the international language.

Her Majesty appreciates your thoughtfulness in writing as you did and, in return, The Queen sends her warm good wishes to you and to all concerned for a most memorable and successful day of celebration.

Yours sincerely,

Mrs Sonia Bonici, MVO
Senior Correspondence Officer

Mr. Brian Barker.

Pola Radio de Ŝikago Parolas pri Esperanto

Antaŭnelonge du niaj membroj, kiuj devenas de famaj polaj esperantistaj familioj, parolis pri Esperanto en la Pola Radio DEON en Ŝikago. La tutan intervjuon oni povas aŭskulti en la reto:

tinyurl.com/ozvmocu
kie ankaŭ aperis la foto de la parolantoj en la radia studio kaj la resumo de la interparolo. Profesoro Jerzy Dobrzynski estas muzikisto, frato de la fama esperantista filmisto Roman Dobrzynski, kaj



nia prezidanto d-ro Leszek Kordylewski estas biologo, filo de la astronomo Kazimierz Kordylewski, kiu famiĝis pro siaj kosmaj malkovroj (vd Saluton, 11/2007). Ilia radia prezentado okazis pro la lasta decido de Pola Ministerio de Kulturo oficiale rekonii Esperanton kiel pola kultura heredaĵo. Estas notinde, ke en Ŝikago pri Esperanto interesiĝas ankaŭ Pola Muzeo (Polish Museum of America), kiu en sia biblioteka kolekto posedas librojn en Esperanto.

–Informis L. Kordylewski kaj Preparis Araneo

Novajoj de Librobreto

Krimeo estas nia estas verkita similstile kiel *Homoj de Putin* (vd foton de *Onklo putino*), kiel raporto pri la vojaĝo de Kniivilä tra Krimeo kaj al Kijivo, dum kiu li intervjuis multajn civitanojn, sed ĉi-foje aŭdeblis pli da kontraŭ-Putin-aj voĉoj ol en la unua libro. La fakto, ke temas pri okazaĵoj ĵus okazintaj, kaj parte dum lia vojaĝo ankoraŭ okazantaj, tamen igas lian duan libron iom alikaraktara ol la unua, en kiu ja temis pri la ĝenerala nuntempa politika etoso kaj ne specife pri aktuala okazaĵo.

Ĉiuj civitanoj de Krimeo estis surprizitaj pri la rapideco de la okazaĵoj en Krimeo inter la 22a de februaro 2014, kiam la ukrainuja prezidinto Janukoviĉ fuĝis el Kijivo, kaj la 18a de marto, kiam Krimeo estis oficiale akceptita de Rusujo en sian “familion”. Sed dum por kelkaj temis pri pozitiva surprizo, aliaj estis konsternitaj pro la subitaj ŝanĝoj, aŭ eĉ devis tute ŝanĝi siajn vivplanojn, precipe homoj aktivigintaj kontraŭ la rusiĝo de Krimeo.

Kniivilä intervjuis krimeajn tatarojn, kiuj aparte suferis pro la politikaj ŝanĝoj, ĵurnalistojn, kiuj estis subpremitaj aŭ ekzilitaj pro sia kritika raportado pri la okazaĵoj, kaj simplajn civitanojn, ĉu subtenajn aŭ kontraŭajn al la rusuja transpreno de Krimeo. Li vojaĝis tra diversaj partoj de Krimeo, kio ja gravas pro signifaj lokaj diferencoj: en la urbo Sebastopolo, kiu estis fermita urbo dum sovet-uniaj tempoj, kaj eĉ post la sendependiĝo de Ukrainujo restis la bazo de la nigramara floto de Rusujo, la ĝenerala sinteno al Rusujo estas multe pli pozitiva ol en la resto de la duoninsulo, kaj sekve ankaŭ la rusujiĝo de Krimeo estas konsiderata bonaĵo de preskaŭ ĉiuj. Post sia vojaĝo tra Krimeo, Kniivilä ankaŭ vizitis la ukrainujan ĉefurbon Kijivo por tie renkonti eksajn krimeanojn, kiuj pro opozicia agado aŭ kritika ĵurnalismado devis forlasi Krimeon.

Kial Esperanto gajnis la batalon kontraŭ aliaj internaciaj lingvoj kaj perdis la militon kontraŭ la angla? Tiun demandon provas respondi Roberto Garvía en sia ĵus aperinta akademia verko “Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language” (Esperanto kaj ĝiaj rivaloj, la lukto por internacia lingvo).

–Antaŭ kelkaj semajnoj surprizo trakis diversajn forumojn de Esperantujo: la eldonejo de la Universitato de Pensilvanio anoncis publikigon de libro pri Esperanto. Ĝia titolo estas “Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language” (Esperanto kaj ĝiaj rivaloj, la lukto por internacia lingvo, University of Pennsylvania Press, 2015), kaj ĝi ekzamenas la strategiojn sekvatajn de la partianoj de tri planlingvoj, Volapuko, Esperanto kaj Ido, kaj la kialojn pro kiuj Esperanto venkis en la batalo de la artaj lingvoj, kaj tamen malvenkis en la milito por la dominanta rolo en la internacia areno fronte al la angla.

Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Randy Ream
1835 N. Natoma Ave.
Chicago, IL 60707
773-262-7738
www.esperanto-chicago.org

Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski
Vicprezidanto – Randy Ream
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk
Sekretario – Tina Seastrom
Kasisto – Karlo Gunn

MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;
Familia membro: \$30,
Regula: \$20
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer, Charles Gunn 828 S. Ada St, Chicago IL 60607-4105

KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Cobbler Square Loft Apts.
1350 N. Wells St., Chicago, IL
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t.**

SEKVANTAJ KUNSIDOJ

28an de Julio – Gvidas vic-prezidanto Randio. Atenton! La malnova loko: Sulzer Library, 4455 N Lincoln Ave.

28an de Aŭgusto – Partoprenintoj raportas pri la 100-a UK. La nova adreso: 1350 N. Wells St. Bonvenon! Por senpaga parkejo bv telefoni al Viktoro laŭ la numero (773) 344-2276.

La surprizo venis el la fakto ke la aŭtoro ne estis konata esperantisto, sed profesoro en madrida universitato, verkinta en la angla lingvo kaj eldoninta en Usono, en faka prestiĝa eldonejo ekster niaj rondoj. Post iom da esploro evidentiĝis, ke li tamen jam havis iajn kontaktojn kun Hispana Esperanto-Federacio, cele al projekto de esploro, kiu tamen ne konkretiĝis ĝis nun, kaj ke li havas profundajn konojn pri nia movado.

–Libera Folio